


Numero: 301.
Junio 2017.

25-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefono: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Nova epoko

Birdeto

Ĉu ankoraŭ VESPERTO LITERATURAJ FOLIOJ travivos tricent monatojn?

Mi tre ŝatus kaj mi esperas, mi havos forton kaj sanon redakti ĝin.

Kompreneble ankaŭ viaj kunlaboro kaj subteno estas tre grava. Sen vi mi ne povos redakti Vesperton.

Mi volonte faras ĝin. Ĝia redaktado estas tre agrabla kaj amuziga por mi. Redakti esperantolingvan eldonaĵon estas nobla afero. Mi scias kaj kredas, Vesperto servas Esperanto-kulturon.

Certe nun estas kiuj pensas, mi estas fanfaranto kaj kredas, mia eldonaĵo estas grava kaj ĝi estas la plej brila stelo sur la firmamento de Esperanto.

Ĝi estas nur malgranda stelo. Eble ĝia lumo estas pala kaj ĝi ne estas videbla en la tuta Esperantujo.

Malgraŭ tio mi ŝatus, se ĝi okupus sian indan lokon.

Tial mi petas miajn legantojn, en la estonto helpu min!

Sendu viajn kontribuaĵojn, sciigojn! Min ne ĝenas viaj sinceraj kritikoj. Mi ĝojas, se vi sincere skribos vian opinionon.

Mi ne deziras, ke Vesperto estu laŭdata senĉese! Mi scias, ofte ekaperas en ĝi eraroj, kaj kio ne plaĉas al vi.

Lingve ĝi estas kontrolata fare de mia karega helpantino Erzsébet Tuboly. Ŝia helpo estas necesa.

Elizabeto mi estas tre dankema al vi. Sen vi certe Vesperto estus plenplena de lingvaj eraroj.

Espereble iam mi povos rekompenci vian helpon.

Se mi deziras ankoraŭ tricent numeron, tiam antaŭ mi estas multe da laboro. Mi ŝatus, se ĝi restus simila esperantolingva eldonaĵo, kiel ĝis nun.

Skribu al mi pri kio vi ŝatus legi en la sekvaj numeroj! Ankaŭ en la estonto mi planas aperigi versojn de komencantoj. Mi ĝojus, se Vesperto fariĝus literatura metiejo de novbakitaj geesperantistoj.

Trankvile turnu vin al mi kun viaj versetoj, rakontoj, noveletoj ktp.

Mi atendas viajn kontribuaĵojn ankaŭ en la sekvaj monatoj.

— Redaktanto —



Birdeto

Iam en fora lando vivis birdeto. En ĉiu jaro aŭtune ĝi flugis al Afriko. En ĝia naskiĝlando la vintro estis tre frosta. Ĝi ne povintus transvivi la teruran vintron.

Kiam la tagoj mallongiĝis kaj la noktoj fariĝis malvarmaj, la birdeto ekflugis. Ĝi flugis multe da tagoj ĝis ĝi atingis la varman kontinenton.

Post longa flugo alvenante ĝi trovis alian birdeton en sia tiea nesto. Ĝi tre koleriĝis, kial la alia birdeto okupis ĝian hejmon, kie ĝi ĉiam loĝis ĝis printempo.

— La nesto estas la mia — ĝi diris aplombe. — For de mia hejmo! Serĉu aliloke neston por vi.

La fremdulo komprenis nenion el la pepado. Ĝi ne parolis la lingvon de la birdeto. Ĝi strange rigardis per siaj malgrandaj okuloj.

La alvoko plurfoje estis ripetita. Per la flugiloj estis montrita al ĝi, ke estus bone, se ĝi forlasus la neston.

La birdetoj ne parolis saman lingvon. Ili venis el diversaj nordaj landoj. Neniu volis forlasi la neston.

La ĵus alveninta birdeto malĝojis, ke ĝi ne parolas iun mondolingvon. Se almenaŭ Ĝi sciis iun gravan lingvon, tiam eble ĝi povus komprenigi sin.

Sed ĝi sciis neniun lingvon krom la sia. Tial fine ĝi devus serĉi alian neston.

Ankaŭ ni homoj ofte travivas similajn, ĝenajn situaciojn. Post tiaj kazoj ni ĉiam promesas lerni lingvojn. Sed tiuj ĉi promesoj restas ĉiam nur promesoj. Ni rapide forgesiĝas pri la lingvolernado. Kvankam kiom bone estus se ni parolus perfekte plurajn lingvojn.

Vere ellerni ĉiom da lingvoj de la homaro estas neebla. Eĉ nur kelkaj homoj povas ellerni du — tri lingvojn. Oni ne havas tempon kaj energion por la lernado.

Ĉu ne estus laŭdinde, se la homaro havus duan gepatran lingvon? Kiom facile ni povus komprenigi nin eksterlande.

Ĉu ne?

Tiu ĉi lingvo povus esti Esperanto. Ja, jam oni parolas kaj uzas ĝin vaste sur la tuta terĝlobo.

Ni esperu, en iu tago la zamenhofa lingvo estos uzata ankaŭ oficiale en ĉiu lando kaj ĝi plifaciligas nian vivon.

— Ŝaŝa —



Noveleto

La malhelo

— Apáti Kovács Béla —

02

Li ne sciis, kiom longe vagadis en la arbaro ĝis sukcesis atingi la vilaĝon.

Li neniam estis tie ĉi. Ĉio estis fremda por li. Krome jam estis nokto. Neniu estis sur la strato. La tuta vilaĝo dormis. Nur la domgardantaj hundoj ekbojis lin, kiam li iris preter la silentaj, senlumaj domoj.

Li ne ŝatis la noktajn, fremdajn vilaĝojn. Ili ĉiam malgajigis lin.

Nun kien iri? De kiu peti helpon, tranoktejon por ripozi iomete kaj matene iri plu?



Li estis senkonsila. Almenaŭ la drinkejo estus malfermita. Sed ankaŭ la unusola drinkejo de la vilaĝo hodiaŭ frue fermiĝis pro la manko de la gastoj.

Labortage nur kelkaj vilaĝanoj vizitas ĝin. Ĝenerale tie ĉi nur semajnofine estas vivo.

Li lace staris antaŭ la drinkejo. Li faris nenion. Li nur staris kaj atendis la matenon.

Neatendite el la najbara strato policoaŭto venis kaj haltis antaŭ li. Du junaj policistoj descendis el la aŭto kaj ili demandis lin:

— Kion vi faras tie ĉi?

— Mi ĵus alvenis la vilaĝon. Mi ne scias, kie mi trovos tranoktejon.

— Bonvolu la dokumentojn!

Li serĉis la personan legitimilon en la poŝo de la jako kaj ĝin li transdonis al la policistoj. Ili longe rigardis ĝin, eĉ unu petis ankaŭ informon el la centro. Ĉio estis en ordo. Li ne estas serĉata, kiel krimulo. Fine la pli alta policisto rimarkis:

— Ne estas bone, ke vi staradas nokte antaŭ drinkejo. Iu telefonis, ke suspektinda persono estas sur la strato.

— Mi ne scias, kien iri ĉi nokte. Mi ne havas gekonatumojn en la vilaĝo. Ĉu vi povus helpi al mi?

— Polico ne estas savarmeo — respondis iu policisto. — En la vilaĝo ne estas hotelo kaj la urbo estas malproksime. Estas malhele vagadi ĉi tie. Ni

proponas al vi, apud la preĝejo estas malgranda parko, kie vi trovos benkojn. Tie atendu la mateniĝon. Poste faru laŭ via deziro. Sed ni atentigas vin, bonvolu ne fari malbonon!

La policistoj foriris kaj li denove restis sola. La policistoj pravis. La plej bone estos atendi la mateniĝon apud la preĝejo.



La nokto ankoraŭ ne estis malvarma, eĉ la vetero estis tre agrabla pasigi la sekvajn horojn ekstere en la malgranda parko.

Vere li ne sciis, poste kien. Ankaŭ ĉi tiu vilaĝo estas fremda por li. Malgraŭ tio ĝi estas pli amikema, ol la densa arbaro. Li ĝojis, kel li povis liberiĝi el ĝi, kie la pikaj arbustoj vundigis lian korpon.

Malrapide irante, preskaŭ promenante li iris al la preĝejo. Li serĉis konvenan benkon, kie li povos atendi la unuajn sunradiojn de la mateno. Dank' al Dio, ĉi nokte ne pluvus.

En la malproksimo palaj lampoj prilumis la malgrandajn vilaĝajn domojn.

Li sciis kaj sentis, se alvenos la mateno, tiam lia vivo estos pli bona. La lumo ĉiam donis al li forton kaj esperon. La helaj sunradioj ĝojigos lin kaj ĝis vespero la vivo denove estos gaja kaj sennuba.

La malheleco estas lia malamiko. Li bone scias, se forflugas la tagaj horoj poste denove estos malhelo, kiam li devos serĉi novan vojon kaj ekiri tra la densa, malhela arbaro ĝis la sekva vilaĝo aŭ urbo.

Tiel okazas ĝi de tago al tago kaj eble neniam finiĝos. Vane li sentas matene, ke trovis la sencon de sia vivo. Vespere ĉio renversiĝos kaj li devas iri kaj iri ĝis la fino de sia vivo. Jen ĝi estas lia sorto.

— Fino —

— Apáti Kovács Béla —



Poezio

Petőfi Sándor

Sándor PETŐFI [ŜANdor PEtefi] (naskiĝis la 1-an de januaro 1823 aŭ la 31-an de decembro 1822, mortis la 31-an de julio 1849?) estis la pseŭdonimo de **Sándor PETROVICS**, hungara nacia heroo kaj poeto.

Nacia kanto

Ek, hungaro! La patrian
vokon aŭdu! Nun, se iam!
Aŭ plu sklavi aŭ liberi:
jen demand'! Ĉu konsideri?
Je la dio de l' hungaroj
diras ni,
ĵuras ni, ke jugon plu ne
tiras ni!

Ni ĝisnune estis sklavoj,
kaj damnitaj la praavoj,
ĉar vivintajn en libero,
ilin premas sklava tero.
Je la dio de l' hungaroj
diras ni,
ĵuras ni, ke jugon plu ne
tiras ni!

Tramp' sentaŭga ja poltrone
timas morti, se bezone,
ŝatas pli la vivon vantan,
ol honoron patrolandan!
Je la dio de l' hungaroj
diras ni,
ĵuras ni, ke jugon plu ne
tiras ni!

Ĉeno rustas, glavo flamas,
glav' la brakon pli ornamas,
ĉu ni tamen ĉenon trenu?
Praa glavo, vin ni prenu!
Je la dio de l' hungaroj
diras ni,
ĵuras ni, ke jugon plu ne
tiras ni!

Ree brilos nia lando,
inde je l' malnova grando,
koton de centjaroj hontaj
nun ni estas delavontaj!
Je la dio de l' hungaroj
diras ni,
ĵuras ni, ke jugon plu ne
tiras ni!

Kie niaj tomboj estos,
nepoj genuflekse festos,
bene en la preĝon dankan
plektos nian nomon sanktan.
Je la dio de l' hungaroj
diras ni,
ĵuras ni, ke jugon plu ne
tiras ni!



Por infanoj



Malbona knabeto



Iam estis virino kiu havis fileton kies nomo estis Peĉjo. La knabeto estis tre malbona. Neniam li obeis al sia patrino.

Pro tio lia patrino estis tre, tre malĝoja. Vane ŝi petegis, Peĉjo ne fariĝis bona.

En iu tago kiam la patrino ne estis hejme, la knabeto decidis, ke li faros malbonaĵon. Li renversos la tutan domon.

Peĉjo ne ŝatis la ordon. Li ĉiam disfalis siajn vestaĵojn. Lia patrino longe devis labori ĝis denove ordo estis en la domo.

Nun la knabeto iris de ĉambro al ĉambro. Li renversis ankaŭ la kuirejon. Fine jam nur la kamero restis. Ĉi tien Peĉjo nur malofte eniris, ĉar en la kamero estis malhelo. Li timis tie, ĉar laŭ li en ĝi loĝas eta koboldo, kiu punas la infanojn, se ili kondukas malbone.

Malgraŭ tio nun Paĉjo eniris ankaŭ ĉi tien. Ja, li jam estas granda knabo kaj li ne timas de eta koboldo.

Vere iomete li hezitis antaŭ ol eniri la kameron. Sed fine li malfermis la pordon kaj li laŭte diris:

— Koboldo, mi jam estas granda knabo. Mi ne timas de vi. Mi estas forta kaj en la infanoĝardeno mi havas amikojn.

Longe nenio okazis. Fine li jam komencis esperi, eble koboldo ne ekzistas. Lia panjo nur timigas lin por ke li estu bona knabo.

En la kamero estis multaj interesaj mebloj, aĵoj, kiuj vekis la interesiĝon de Peĉjo. En la angulo staris granda, olda ŝranko. La knabeto estis tre scivolema, kio estas en ĝi. Li iris al la ŝranko kaj singardeme malfermis ĝiajn grandajn pordojn. Kiam la pordoj grincante malfermiĝis, el ĝi elsaltis eta koboldo kaj kolereme diris:

— Kial vi vekis min el mia sonĝo? Ĝenerale mi dormas ĉiutage posttagmeze en tiu ĉi ŝranko.

Apenaŭ mi endormiĝis kaj vi vekis min. Vi estas tre malbona knabo. Mi nun punos vin.

Peĉjo volis elkuregi el la kamero, sed li ne povis. La koboldo ŝlisis la pordon per sorĉovorto.

— Vi devas resti ĉi tie – diris serioze la koboldo. – Via puno estos, ke vi devos nombri la papavosemojn en ĉi tiu poto. Se vi ne faros tion ĉi, mi sorĉos vin je koboldo. Ĝis la mondfino vi devos servi min.

La knabeto tre ektimis, ĉar la poto estis giganta kaj ĝi estis plenplena de papavosemoj. Li ankoraŭ ne estas lerneĵano. Nur ekde aŭtuno li vizitos la unuan lernejaron. Bone se li povas nombri ĝis dek. En la poto estas multaj, multaj papavoj.

Peĉjo laŭte ekploris:

— Mi ne deziras fariĝi koboldo. Panjo mia kara, bonvolu helpi!

— Ne ploraĉu! – kriegis al li la koboldo. – Via panjo ne povas helpi, ĉar ŝi ne estas hejme. Do, ek al la laboro!

Certe ankaŭ vi scias, patrinoj ĉiam antaŭsentas, se sia fileto estas en danĝero. Ne gravas, se la infano estas la plej malbona en la mondo. Ŝi rapidegas helpi.

Ŝi aŭdis ankaŭ la helpkrion de Peĉjo kaj ŝi tuj kuregis hejmen. Ŝi alvenis lastmomente, ĉar la koboldo jam volis serĉi lin.

— Kie vi estas fileto mia? – ŝi demandis panike.

— Ĉi tie. Ĉi tie – ploregis Peĉjo.

La virino iris al la pordo de la kamero kaj perforte malfermis ĝin.

— Dio mia, ĉi tiu ŝlوسilo denove malboniĝis. Ankoraŭ hodiaŭ mi diros al via patro, ke li riparu ĝin! Sed kial estas en viaj manoj tiu poto da papavo? Ĉu vi deziras manĝi kukon kun papavo?

Peĉjo volis rakonti sian travivaĵon kun la koboldo, sed dum li ĉirkaŭrigardis ĝi malaperis. Certe ĝi reiris en la ŝrankon.

La virino karesis la kapon de sia fileto kaj ŝi diris:

— Bonega ideo por vespermanĝo kuko kun papavo. Ankaŭ via paĉjo tre ŝatas ĝin.

Okazis miraklo, ĉar ekde tiu ĉi tago Peĉjo pliboniĝis kaj plurfoje li ne faris malordon en la domo.

Infanoj, laŭ mi, vi scias kial. Ĉu ne?

— Onklo Adalberto —



Humuro

- Kial veturas la bopatrino per biciklo?
- ???
- Ĉar ŝia balailo estas ĉe la riparisto.

— o —



- Kial vi ploras knabeto? – demandas najbarino Peĉjon.
- Ĉar mia paĉjo deziras bati mian ĝemelfraton.
- Ho, Dio mia! Vi estas tre bona knabeto. Ĉu vi tiom kompatas vian frateton?
- Ne. Sed nia paĉjo ĉiam intermiksas nin.

— o —



- Ĉu la bakaĵo estas freŝa? – demandas la gasto la kelneron, antaŭ ol elpreni ĝin el la korbeto.
- Mi ne scias. Mi laboras tie ĉi nur depost tri tagoj.

— o —

Humuro

- Kion faras la bona edzino post la seksumado?
- ???
- Ŝi vestas sin kaj ŝi iras hejmen al sia edzo.

— o —



- Dum la biologia lernohoro la instruistino demandas la gelernantojn:
- Kiu besto donas al ni la lakton? Ĉu vi scias?
- Knabeto anonciĝas:
- En la laktovendejo la vendistino.

— o —



— o —

- Ĉefo al sia subulo:
- Ĉi semajne vi jam malfruis kvinfoje. Ĉu vi scias kion ĝi signifas?
- Jes. Jam estas vendredo.

— o —